

# Raporto pri jarkunsido de la asocio Esperanto Midi-Pyrénées

Ĝi okazis en Foix, Auberge Léo Lagrange, la 15an de decembro 2013.

Ĉeestintoj: Christophe Chazarein (31), Robin' Beto (64), Françoise Carrieu (65), Gilbert Darrieux (65 - au CA), Marion Quenut (31 - au CA), Mari-Do Nelca (31), Renato Ballaguy (09), Kinou Dardennes (09), Marko Mirindo (65), Monik' Garrigues (09). Présidence de séance : Christophe. Prise de notes : Monik'.

Ekskuzitaj: Jeannette kaj Rikardo Cash, Jorgos Comte

Komenco je 9h50



**Modifiita tagordo : 1. Agadraporto – 2. Financraporto – 3. Projektoj – 4. Elekto de la komitato**

## 1. Agadraporto

Kelkajn lingv- aŭ tajp-erarojn oni korektis.

Pri CEEA, kelkajn informojn, datojn, nomojn oni aldonas.

Pri la asocio Tarn Esperanto Michel parolis pri la translokado de la sidejo de Albi en Lavaur, pri la nova estraro, pri la nova nomo de tiu asocio : « Esperanto Tarn ». Ili deziras daŭrigi la partoprenon al la regiona federacio. Iliaj projektoj por pludaŭrigi la vivon de tiu asocio : partopreni la fojron Biocybèle kaj proponi kursojn al estontaj novaj esperantistoj.

Pri la laborgrupo pri rilatoj, Robin', Marion kaj Gilbert klarigis ke la laboro bone komenciĝis per interesaj retaj interŝanĝoj sed ne sufiĉe por ekdissendi proponojn.

## 2. Financraporto

En la raporto, la kotizoj ne inkuzivas 18 € de C.E.E.A, malfrue pagitaj. Inkluzivas repagoj de Esperanto-France, sed eble por la 2 lastaj jaroj, Marion petis klarigojn sed ankoraŭ ne ricevis respondon.

Porinforme la kotizoj E.K.C., C.E.E.A., kaj Espéranto Tarn estas 1,50€ pro ĉiu membro. Por Esperanto France repagas po 1,50€ pro siaj membroj loĝantaj en la regiono.

Agada kaj financa raporto estis aprobatataj ĉiesvoĉe.

## 3. Projektoj

Pri **rekonsidero al la kontrakto Esperanto-France - Esperanto Midi-Pyrénées**, la laborgrupo starigita pasintan jaron ne vere laboris, sed tamen la demando restas aktuala.

Dum la gruplaboro, ŝanĝo de statuto aperis necesa paŝo, ne nur pri rilato al Esperanto-France sed ankaŭ pri la funkciado de voĉdonoj en la kunsidoj...

Por provizore klarigi la aferon, Marion proponis **ke ni suspendu la kontrakton kun Esperanto-France** (la repagon de Esperanto-France al nia asocio, la sendon de reprezentantoj al komitatkunvenoj) **ĝis la venonta jarkunsido** kiam espereble, fina decido alvenos pri la statuto, kaj kune novaj proponoj kunlabori.

Propono aprobita : 7 aprobis, 3 sindetenis

Post listado de **projektoj regionskalaj**, jam lanĉitaj aŭ lanĉindaj, la asembleo proponas **regulajn laborkunsidojn (2 aŭ 3 fojoj jare) de aktivuloj en Arrout**, antaŭ ĉiu semajnfina staĝo. Tiuj kunsidoj estos malfermitaj al ĉiuj, membroj aŭ ne de regionaj asocioj, sed kiuj deziras kunlabori regionskale. La unua : la 21.an de marto, vendrede vespere.

Kelkaj el la **projektoj** pritrakteblaj...

- Radioelsendoj (Avajrono, arieĝo, Tuluzo...)
- Trejnado de aktivuloj pri komunikado, instruado...
- Akcepto de volontulo, de aliaj eksterlandanoj, kuninvitoj de pasportaservanoj...
- Uzado de la portalo (kunredaktado, kreado de paĝoj por la aktovuloj kaj la kunlaborado, ex: paĝo pri la materialo disponebla kaj pruntebla de ĉiu asocio aŭ aktivulo)
- Disvastigo de Esperanto en la regiono (sekvo de la projekto de Christophe)

- Venonta "Fête de l'espéranto", preparo de la venonta jarkunsido
- Laboro pri nova statuto
- Kunlaboro kun "naciskalaj" asocioj

Pri **venonta zam'festo/ fête de l'espéranto**, ĝi ne plu okazu en Arieĝo sed prefere en Alta Garono, ĉar de du jaroj ne plu okazis tie, aŭ kial ne en Tarno, kial ne en Tarbo aŭ Banjero. La tieaj aktivuloj ekpripensu la aferon.

Pri **disvastigo de Esperanto en la regiono**, unutaga kurso por komencantoj okazos la 29a de marto en Cahors kaj verŝajne denove Christophe proponos esperanto-budon en la organika-fojro de Montauban septembre.

**Mona subtenado** : La kunsidantoj konstatis ke la subteno de Interkant estis profitinda (bona sukceso de la koncerto en Lavelanet). Konsekvence la asocio pretas por subteni similajn demandojn rilate al la regiono. La komitato decidis laŭ veno de petoj kaj financstato.

Informo : La asocio **Eurokka** organizas, kadre de la eŭropa programo Grundtvig, kaj de la projekto « Elloke Tutmonden », **seminarion okazontan de la 21a de ĝis la 24a de februaro en Auzeville** apud Tuluzo. Temas pri hommastrumado (kaj parte pri organizo de koncertoj). Partoprenos dekkvino da esperantistoj de tuta Eŭropo, ĉiu homo de la regiono povos kunĉeesti tiun seminarion, ke ili kontaktu Flo.

#### **4. Elekto de la nova komitato**

Ĉiesvoĉe eelektiĝis **Jorgos Comte, Gilbert Darrieux, Marc Roger, Marion Quenut, Andreo Andrieu, Bernard Legeay, Vincent Descargues**. Ĉiesvoĉe elektiĝis **Michel Metzger, Christophe Chazarein et Francis Bidault**

Marion sendos mesaĝon pri disdono de taskoj kaj postenoj.

Fermo de la kunsido je la 12a.

*Monik', Michel, Marion*